

# esperantoUSA

The ELNA

Newsletter: News of the language problem and Esperanto as a solution

1990 (1)

## Making News This Issue

### More on Criticisms

The Editor takes a look at some of the most common criticisms of Esperanto by the non-Esperantist public and debunks the myths. If you have problems countering criticism of Esperanto in your own encounters, you'll want to read this month's editorial waiting for you just inside the cover.

See Page 2

### ELNA Candidates

Election time for ELNA is rolling around again. The candidates speak out in their own words on the future of ELNA, Esperanto in the U.S., and other issues of interest to all our members. Be informed and vote!

See Page 11

### To Mexico with Esperanto Travel

The Esperanto Travel Service is planning travel to the ELNA convention this summer in Mexico City. Various excursions to the beautiful sites in and around this ancient city are in the works. See the back cover for details on how to participate. *Olé!*

See Page 12

### In This Issue

From the Central Office 5

Pasoj—Transitions 7

Expanded Calendar! 8

And Much, Much More to  
Delight and Inform You!

## Summer camp for Esperantists

### SFSU 1990

by Grant Goodall


The travel section of the *Sunday New York Times* carried an article a few months ago about "summer camps for adults," which are apparently all the rage now among vacation-goers in the know. The idea is that rather than spending your valuable free time at the same old tourist traps that everybody goes to, you can instead spend a few weeks learning how to bake bread and pastries at a cooking school in Vermont, perfecting your cello-playing skills at a conservatory in North Carolina, or brushing up on your Latin at a college in New York, to mention just a few of the possibilities that the author of the article proposed.

Of course American Esperantists have known about this latest "vacation concept" for a long time. For 20 years now, people from all over the world have been

going to California during the summer to study Esperanto at San Francisco State University. This three-week program, which offers everything from beginning classes to advanced seminars, is reputed to be among the best anywhere.

Many people return year after year, and it is easy to see why. SF State has a very pretty campus, and it's an ideal place to immerse yourself in Esperanto for a few weeks. Most participants live and eat together right on campus, so you can spend every waking moment speaking and thinking in Esperanto, if you like (you'll probably even start dreaming in it!). When you feel like playing tourist, a short streetcar or bus ride can take you to Chinatown, Union Square, Golden Gate

Continued on page 4



# EDITORIAL

Cathy Schulze transsendis al mi artikolon, kiun provizis al ŝi Marta Evans. La titolo de la artikolo estas "Nu Canadiane langwaje 'rasional,' eezi to lern," kaj ĝi traktas ies novan projekton por fonetikigi la anglan lingvon. Sur la marĝeno, Marta skribis: "Kara Cathy, Kiel oni kontraŭbatu mensogojn pri Esperanto?"

La koncernaj alineoj legiĝas jene (mi pardonpetas al neanglalingvaj legantoj pro la manko de traduko):

"[Ted W.] Culp, a gray-haired secondary school-teacher, said he always was interested in language and created his Canadian in 1987, the centenary of the artificial language Esperanto once touted as the way to an (*tiel!*) international communication.

"'There's no sense creating a language that no one speaks,' he said of Esperanto and its late founder, the Polish philologist Ludwig Zamenhof. 'That's the fatal weakness from which it will never recover. ... It was just the wrong strategy.'"

Kiel oni respondu al tiaj eraroj? (Mi mem preferas ne uzi la vorton "mensogoj", ĉar mi supozas, ke simple temas pri nescio flanke de s-ro Culp kaj manko de profesia esplorado pri la afero flanke de la [nenomita] verkinto de la artikolo. Mi estas preta akcepti, ke temas pri honestaj eraroj—ĝis oni pruvos al mi la malon.)

Per du paŝoj vi povas rebati tiajn erarojn. La dua paŝo estas: skribi leteron al la gazeto, ĵurnalo, revuo en kiu vi legis ilin—tuj telefonu al la radiostacio, ĉe kiu vi aŭdis ilin. Ne atendu, ke iu alia respondos; necesas, ke vi mem entreprenu tion. Fakte, la apero de tiaj eraroj estas bona oportuno informi la publikon pri Esperanto.

Kaj la unua paŝo? Vi povas trafe rebati erarojn nur se vi mem konas la faktojn.

Ĉu vi konas la faktojn pri Esperanto? Mi ne parolas pri la simplaj faktoj ... ke ĝi estas facile lernebla ... ke substantivoj finiĝas per -O ... ke ĝin inventis iu pola filologo. Ĉu vi konas ĝian historion, ĝian literaturon, ĝian aktualan staton en la mondo? Ĉu vi povas citi anekdotojn el la propra sperto, kaj tiu de aliaj, por montri,

ke Esperanto estas afero ne nur teorie sed ankaŭ praktike bona? Ĉu vi povas kontraŭargumenti ne nur simplajn stultaĵojn sed ankaŭ konkurantajn ideojn, kiuj ŝajnas egale bonaj ... je la unua vido?

Ni rigardu la "faktojn", kiujn nesciante proponas s-ro Culp kaj kiujn naive transdonis al ni la verkinto de la artikolo.

1) Se vi fakte studis ne nur la historion de Esperanto, sed ankaŭ la vivon de Zamenhof, vi tuj rimarkos, ke L.L.Z. ne estis "filologo" sed simpla oftalmologo—ordinara homo, kiu ne profesie sed "nur" amatore rilatis kun lingvoj. Ne forgesu, tamen, ke "amatoro" etimologie signifas "amanton". Cetere, filologoj studas lingvojn por analizi ilin kaj konstati jam ekzistantajn regulojn pri ilia ŝanĝiĝemo. Zamenhof estis lingva artisto; lia kapablo estis ne nur analizi, sed ankaŭ sintezi lingvon. Ne ekzistas scienca nomo por tiaj homoj, ĉar en la historio ili ege maloftas—kompare kun la filologoj.

2) Cetere, Zamenhof estis pola nur geografie; gente li estis judo (kaj sufiĉe kaj prave fieris pri tio), kaj laŭ nacio li opiniis sin ruso—la rusa estis lia denaska lingvo.

3) Lia nomo estis ne Ludwig (aŭ, pli ĝuste, Ludovik); tiun nomon oni fiksas al li pro rusa leĝo, kiu postulis, ke ĉiu infano havu "kristanan" nomon. Fakte, lia vera nomo estis Lazar, kaj prave oni nomus lin, en lia denaska lingvo, Lazar Markoviĉ Zamenhof, t.e. Lazar Filo de Markus Zamenhof.

4) Ke "ne havas sencon krei lingvon, kiun neniu parolas", tio simple signifas, ke laŭ s-ro Culp tute ne havas sencon krei lingvon; ĉar en la momento de kreo, lingvon laŭdifine parolas neniu. Ĝuste Esperanto, tamen, pravas, ke tio ne estas nesuperebla malavantaĝo; ĉar la fenomeno kreskado de Esperanto okazis ĝuste en jarcento, kiam pro la ekonomia, politika kaj milita premo de la grandaj lingvoj la malgrandaj emis velki kaj malaperi.

5) Ĉu fakte neniu parolas Esperanton? Se jes, kiom da homoj do scipovas la lingvon? Nu, ni povas fantazii ciferojn ĝis ni dronos en ili, sed mi mem kutime diras: "Inter du kaj dek-kvin milionoj da homoj povas komuniki pere de Esperanto; la faktan ciferon mi supozas pli proksima al la 'du' ol al la 'dek-kvin'". Se

vi volas uzi ian oficialan nombron, la *World Almanac and Book of Facts por 1989* uzas la ciferon du milionoj en la tabelo de la plej ofte uzataj lingvoj de la mondo."

Ĉar "la plej bona defendo estas atako", estus bone ankaŭ scii ion pri la amataj ĉevaletoj de la kritikantoj de Esperanto. Tiu de s-ro Culp estas la fonetikigo de la angla lingvo, kaj ankaŭ ia raciigo de ĝia gramatiko. Tio estas evidente bonega ideo; la angla lingvo certe bezonas ian plibonigon. Ĉu vi scias ion ajn pri la historio de la fonetikiga movado? Ĉu vi povas ĝuste taksi ĝiajn ŝancojn de sukceso? Ĉu fakte fonetikigo de la angla lingvo estas entrepreninda?

Jen kelkaj respondoj. S-ro Culp ne la unua proponas tiajn ŝanĝojn en la angla lingvo, sed malgraŭ multaj tiaj proponoj dum la pasinta jarcento—ekzemple, la fonetikiga kampanjo de la *Chicago Tribune*, kies eldonisto forte financis ĝin—neniu tia movado lasis eĉ spuron en la hodiaŭa angla skriblingvo. Kaj cetere, laŭ mia kompreno neniu fanatika fonetikisto iam ajn respondis la eksterordinare gravan demandon: Kies anglan lingvon ni fonetikigu? Ĉar se oni fakte ekuzus fonetikan sistemon similan al tiu de s-ro Culp, la supra frazo legiĝus, en la fonetika usona lingvo, "Nyu Kaneidyan langwaje 'rashunl,' eezee t lrn." Kaj la diferencoj inter la usona kaj, ni diru, la aŭstralia skriblingvoj estus eĉ pli profundaj. Efektive, ĉiu libro verkita en la brita kaj aŭstralia angla lingvoj devus esti almenaŭ transliterumitaj antaŭ vendo al usonanoj, kaj inverse. En la nuna momento, la tute neracie literumata angla skriblingvo ludas unuigan rolon en la anglalingva mondo, same kiel la ĉina skriblingvo en Ĉinio dum multaj jarcentoj.

Jen kelkaj aliaj ordinaraj "faktoj" pri Esperanto, kiuj fakte aperis en la gazetaro dum lastaj monatoj. La nombro de Esperanto-parolantoj atingis sian supron en 1930 ... Esperanto taŭgas por verki librojn pri Esperanto, sed por nenio alia ... ĉiuj esperantistoj (= parolantoj de Esperanto) estas "vortmarotistoj" kiuj celas mondan unuigon.

Se tiuj aŭ similaj stultaĵoj aperus en gazeto aŭ revuo, kiun vi legas, ĉu vi povus respondi ilin?

—Don Harlow

# NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

Prof. Ron Glossop provides an excellent short article "Esperanto Vivas — Eĉ en Usono" in the *Newsletter* of the Illinois Foreign Language Teachers Association (Spring, 1989). Prof. Glossop again emphasizes the great potential of Esperanto in teaching foreign languages to gifted young people. (from the C.O.)

In its most recent catalog, "Audio-Forum," a marketer of audio-visual foreign-language courses, includes the Esperanto course *Jen Nia Mondo*, developed by "the internationally noted linguist" Dr. John C. Wells, who is currently also the president of UEA. "Audio-Forum" has headquarters in Guilford, CT, and London, England. (from Eldon Beard and Cathy Schulze)

The Los Angeles, CA, *Times* (Oct. 16, 1989), in an article "All Greek to You? But Not to Esperanticists" (*sic!*) by James Tortolano, briefly discusses Esperanto and former Garden Grove, CA, mayor J. Tilman Williams, an ardent promoter and user of the language. (sent by Peggy Zarchy)

Laurence Siegle, describing "Cast creating characters for [the play] 'Social Security'" in the Brownsville, TX, *Herald* (November 5, 1989), mentions ELNA member Prenda E. Cook ("Sophie Greenglass"), her "almost total immersion in Esperanto, the international language," and her participation in Esperanto congresses in seven (named) countries. (sent by Prenda Cook)

To Steve Jobs, formerly of Apple Computer ("Unix is the Esperanto of operating systems") and computer columnist George Morrow ("Esperanto was a product of the academic world in the 1930's ... it failed miserably") we can now add Schlumberger software systems specialist Dr. Scott Guthery, who in an article on object-oriented programming in *Dr. Dobb's Journal* (December, 1989) blithely states that "Esperanto was wonderful for writing books about Esperanto but not much else." Scott, *pli bonus se vi*

*skribus mute, ĉar en real' vi fuŝis tute!* (pointed out by Andy Beals)

"Esperanto tipped as language of the future," says Luke Slattery, education reporter for the Melbourne, Australia, *The Age* (Jan. 4, 1990). Mr. Slattery quotes at length from Dr. Peter Ellyard of the Commission for the Future, who was scheduled to open the 27th Congress of the Australian Esperanto Association in Melbourne the following weekend. The article generated an "objective critique" of Esperanto ("this bloodless, backboneless, witless deformity") by a Mr. D. G. H. Jones (Jan. 8, 1990) and a reasoned response to Mr. Jones by Mr. Justice K. Enderby, vice-president of the AEA (Jan. 10, 1990). (from Leonard E. Blickenstaff, M.D.)

Martha Ullman West, in two articles in the Portland, OR, *Oregonian* (Jan. 12, 1990) about the Oregon Dance Consort's presentation "Descendants," gives special mention to the finale, led into by singer Jacqui Sutton singing "Amazing Grace" in Esperanto. (sent by Jim Deer)

"Try Esperanto," advises Cynthia Libby in a letter to the San Francisco, CA, *Chronicle* (Jan. 17, 1990). Ms. Libby describes her use of Esperanto in a trip through the Eastern Bloc, the Soviet Union and China, regions where "English goes nowhere." "Until you experience [the lack of language barriers]," says Ms. Libby, "you can't imagine the pleasure of such direct communication. Esperanto is the language of international friendship." (noticed by I. Onet)

An article about a "rasional"-ized version of English, created by Ted W. Culp of Toronto, which appeared in *The Daily Sentinel* (Jan. 24, 1990), suggests that Esperanto has been a victim of poor strategy. "There's no sense creating a language that no one speaks"—though I find it difficult to imagine any other kind of language that one could create.... (sent by Marta Evans & Edwin Harler; see this issue's editorial)

John Mathews, in a letter to the Sacramento, CA, *Bee* (Jan. 25, 1990), points out the difficulty for adults to learn foreign languages, particularly English, and suggests Esperanto as a more viable alternative for interpersonal communication. (sent by John Mathews)

ELNA member Prof. Ronald J. Glossop, in a letter "Freedom To Travel" to the editor of the St. Louis, MO, *Post-Dispatch* (Jan. 27, 1990), urges the U.S. government to rescind its ban on travel to Cuba so that speakers of Esperanto may attend this year's World Esperanto Congress in Havana. "Any imagined bad consequences resulting from our going to such meetings," says Prof. Glossop, "cannot be worse than the bad international publicity we will get from restricting the travel of our own citizens." (sent by Ron Glossop)

"Por Trovi Amikojn Per Esperanto" is the title of an excellent one-page letter by ELNA member Arlyn Kerr in the travel newsletter *Europe Through The Back Door*. Mrs. Kerr does not speak of the history or current number of speakers of Esperanto, but demonstrates the usefulness of the language by quoting specific experiences of her husband Les, her daughter Julie, and Joel Brozovsky in their travels. Editorial comment: this is the sort of article I'd certainly like to see more of. (sent by Arlyn Kerr)

Marilyn McMahon of the Santa Barbara, CA, *News-Press* devotes an article, "Intercontinental travels lead to global volunteer work," to Santa Barbara Esperantist William Mets, mentioning at one point his interest in Esperanto. (sent by Dorothy Holland-Kaup)

The 1990 *Yearbook of Jehovah's Witnesses*, section on Finland, describes the 1922 use of Esperanto by a Brother Har-teva to translate a book about the religion, present its ideas at the 1922 World Congress in Helsinki, and spread the word in Eastern Europe and the Soviet Union. (from James G. Davis)



# REGIONAL REPORT

Esperanto Activity in the United States

## ARIZONA

Esperanto classes are again being taught at Arizona State University this semester by Bill O'Ryan and Angelina Fereshteh O'Ryan. Classes are held on Thursday evenings in the Memorial Union building. (sendis Angelina O'Ryan)

## CALIFORNIA

Dum la aŭtuna studperiodo de 1989, okazis ĉe Universitato de Kalifornio (San Diego) seminario kun titolo "International Language Problems: Can Esperanto Help?" La seminario kunsidis ok fojojn inter la 17a de oktobro kaj la 9a de novembro, kaj valoris unu krediton. La respondeca instruisto estis Profesoro Ralph A. Lewin. (informon sendis Ralph Lewin)

Esperanto estas ankoraŭfoje instruata dum la printempa semestro ĉe la Universitato de Kalifornio (Berkeley). Komencgradan kurson instruas f-ino Joy Elizondo; la laboron de progresiga kurso ree dividas Don Harlow kaj Ionel Onet.

## COLORADO

Martha Evans began an Esperanto class in Grand Junction on Jan. 11. Martha is also teaching handicapped

people, including a 15-year-old boy who was cruelly wounded in an accident. He is now corresponding with a 13-year-old girl in the USSR. (Feb. 1990 News Briefs from SFERO)

## DISTRICT OF COLUMBIA

Ekde la komenco de oktobro, 25 infanoj ĉe la baza lernejo H. D. Cooke rekomencis siajn Esperantajn studojn dufoje semajne. Prizorgas la kurson Linda Satterthwaite, instruistino por speciala projekto, kaj Martha Flores, kiu enkondukas parton de la metodoj lernitaj ĉe la San Francisco Kurso dum la pasinta somero. (el *La Bulteno de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono, DC*)

Vendrede la 1an de decembro Martha Flores vizitis kunvenon de 9-jaraj skoltetoj de Howard County, kiuj lernis pri komunikado. Oni prezentis enkondukan prelegeton, lecionon, kaj Esperantajn kantojn. Ĉar la kvin infanoj kaj iliaj tri plenkreskulaj gvidistoj tuj entuziasmiĝis pri la koncepto de universala lingvo kaj internacia komunikado, ili ŝatis la Jarlibron de UEA, ilia preferata esperantaĵo. (el *La Bulteno de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono, DC*)

## MARYLAND

Lee Stern parolis pri Esperanto la 18an de decembro al 16 studentoj ĉe la Magruder Mezlernejo en Rockville. Sendube kontaktoj kun studentoj kaj instruistoj kreos efikajn avantaĝojn por la antaŭenpuŝo de Esperanto. (el *La Bulteno de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono, DC*)

## MASSACHUSETTS

Dum la tuto de januaro, la Eo-Societo de Nov-Anglio kaj Jill Miller ekspoziciis tri montrejojn da literaturo Esperanta en Natick. La ekspozicio troviĝis en la biblioteko Morse Institute, la publika biblioteko de Natick. (raportis Jill Miller en *Verda Lumo*, la bulteno de ESNE)

En oktobro de 1989, oni invitis Allan C. Boschen verki kaj prezenti du konferencajn referatojn pri Esperanto. Unu, "Potencialo por Apliko de Esperanto en Klerigado", aŭdiĝis en Novjorko, ĉe la Jarkongreso de la St. Lawrence-sekcio de la Usona Societo por Inĝenierada Klerigado (ASEE); la alia, "Esperanto, por Simpligi kaj Klarigi Internacian Komunikadon", aŭdiĝis ĉe la Internacia Komunikada Konferenco, "Komuniki kun la Mondo". (laŭ informo de Allan Boschen)

## SFSU from page 1

Park, or any of the other attractions that San Francisco has to offer. The ocean is just a few blocks from campus, and watching people in hang-gliders hurl themselves off cliffs has almost become a traditional after-class activity.

The classes themselves promise to be especially exciting this year. Two of the instructors, Stefan MacGill and Jovan Zarkovic, will be participating in this program for the first time. Stefan MacGill is a native of New Zealand, lived in Rotterdam for several years while he was director of the Central Office of UEA, and now lives in Budapest. He is perhaps best known for his use of role-playing and humor in the classroom, and he is the author of several very popular

textbooks which make use of these techniques. He is in great demand as a teacher and will be giving courses in the Soviet Union and the Scandinavian countries before coming to San Francisco in June. The other newcomer, Jovan Zarkovic, is also well known as a talented teacher. He has taught in Denmark, Poland, and Bulgaria, in addition to his native Yugoslavia, and he is particularly expert in the "Zagreb method" of teaching Esperanto, which has been so popular in recent years. Mr. Zarkovic is a professional interpreter and currently works in the Yugoslav Embassy in Moscow. He has published a number of translations of literary works into Esperanto and is now working on a book on Esperanto stylistics.

Although all of the instructors will be teaching in all four levels, each level will have its own special focus. Level 1, for beginners, will consist mainly of a combination of the Zagreb and conversational methods which Mr. Zarkovic has used so successfully elsewhere. Students will get a very intensive introduction to the language, while having a lot of fun at the same time. Both levels 2 and 3 (post-baza and mezgrada) will be privileged enough to be able to use MacGill's best-selling book *La laŭta vekhorloĝo* with the author himself. Level 2 will also get a review of basic Esperanto grammar and will be reading Claude Piron's new book *Vere aŭ fantazie*, which was written espe-

Continued on page 5



# FROM THE CENTRAL OFFICE

## Rise in Book Orders

As always, with the publication of the new ELNA BOOK SERVICE CATALOG we have seen a sharp rise in book purchases. We start planning the catalog and its contents about six months in advance to be sure that we have adequate copies of each item in stock.

We moved the publication date to the first of the year so that new members will have an up-to-date listing of the major items we carry. Future editions are planned to appear at about the same time. This is a significant improvement over years gone by when the catalog was a sporadic publication, often outdated and difficult to use.

During the past two years, we have focused on phasing out some of the outdated books we carry. This has not been an easy task, but one facilitated by such sales as "The Surprise Package" and "Books by the Pound." We now have a special list of old, discontinued or damaged items at specially reduced rates. For a complete list, send a large, self-addressed stamped envelope to the ELNA Book Service, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530-1129.

We are very happy to report that even with the general increase of book sales during the past year we are able to ship most orders on the day we receive them.

This is due in large part to the diligent work of Ionel Onet, who is celebrating his one year anniversary at ELNA.

The greatly improved appearance of the catalog is largely due to Greg Wasson, ex-director of the Central Office and now typesetter for *Esperanto U.S.A.* as well as a published author. Greg donated a portion of the time necessary to produce the catalog.

## Handbook For New Members of ELNA

Results from the recent survey about the Handbook for New Members of ELNA are still coming in so it won't be until the third issue of *Esperanto U.S.A.* that the results will be published.

The Handbook was sent to all current ELNA members, both new and long established Esperantists, to get their opinions of the booklet. Specifically, we are looking for areas of needed improvement so that the second edition will be more useful to new members.

If you are a long established Esperantist and haven't returned your survey, please do so now so that your opinions will be counted! If you need another survey, please don't hesitate to ask.

The same goes for our newest members. You might think you are too new to have an opinion, but this booklet was

created for your use. We are anxious to hear from you.

## ELNA Membership Drive

As you can see by the "Membership Thermometer" on the front cover of this issue, our membership level has increased notably since last issue. However, we are significantly below our initial goal of 1000 members for 1990.

If you haven't rejoined yet, now is the time to do so. Check the mailing label on the envelope in which this newsletter arrived. If it says "Expired," then your membership has lapsed as of the date indicated on the envelope.

## Suggestions Sought

The improved quality of ELNA's materials, like the Catalog, Handbook, and informational materials, are the result of two things: greater membership participation and better funding. Without both of these ELNA would not have made the progress it has during the past three years.

If you have suggestions, ideas, comments, proposals, etc., send them to the Central Office. We are always looking for ways to improve our organization and the services we offer.

—Mark Stephens

## SFSU from page 4


cially for students at this level. Piron is always a very entertaining author, and I am sure that students will really enjoy this latest effort of his. Students in level 3 will be reading a wide selection of stories and poems, both humorous and serious, in *Fabeloj de la verda pigo* and the *Baza literatura krestomatia*. In addition, they will be surveying the recent music scene in Esperanto, which has seen a real explosion in growth in the last few years. They will be reading the lyrics and listening to arrangements of songs ranging in style from rock and roll to opera, and just about everything in between. Students in level 4 (supera) will read *La blinda birdo* by the noted Hungarian novelist Istvan Nemere. This book has received very

good reviews and, as it deals with a political theme, should be particularly topical in these days of upheaval and change in Europe. Level 4 will also consist of a "potpourri" of sessions on topics such as stylistics and translation, Esperanto grammar, the history of Esperanto, humor in Esperanto, etc. Students in this level are not particularly known for being shy or lacking in opinions, so I expect (and hope!) that class discussions will be spirited and lively.

It is surely a very fortunate coincidence that both of the foreign instructors this year will be coming from Eastern Europe. When their contracts were being arranged several months ago, who could have imagined that so much would tran-

spire in that part of the world? Who knows what will happen between now and this summer? How will all of these events affect the Esperanto movement in these countries? Since both Stefan MacGill and Jovan Zarkovic are currently "on the scene" right where so much has been happening, I'm sure they will have lots of interesting stories to tell.

For all of the above reasons, I think that the Esperanto program at San Francisco State University this year will be an exceptional experience. Whether you want to think of it as a trendy summer retreat, or as a good old-fashioned way to improve your Esperanto, you won't come away disappointed. □



# LETTERS

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.]

[Grant Goodall, Professor at the University of Texas (El Paso), is a candidate for the ELNA vice-presidency, and will also be the head instructor at the Esperanto Summer Workshop at San Francisco State University this summer. Here are some of the things he's been doing lately...]

The journal *Foreign Languages*, published by Shanghai International Studies University, recently published an article of mine entitled "Kelkaj Rimarkoj pri la Subjekto en Esperanto" as part of a collection of articles honoring the centennial of Esperanto. My article was based on a lecture I gave at that university in 1987 while I was on a tour of several Chinese universities. Shanghai International Studies University trains Esperanto teachers from all over China. A very impressive operation!

In November I was invited to give a lecture at the University of Chihuahua, where I spoke on the history of artificial languages with special attention to Esperanto. This was part of their "Humanities Week" celebration which they have every year. There are not very many Esperantists in Chihuahua, but among them are some very prominent members of the community, so the idea of Esperanto is fairly well known among educated people. The founder of the School of Humanities at the University of Chihuahua, Federico Ferro Gay, is an Esperantist who immigrated to Mexico from Italy. A number of Esperantists there have already made plans to attend the UK in Havana.

Grant Goodall

[ELNA member Doris Vallon-Wheeler, in China to teach English as part of a teacher exchange program, recently participated in the First Asian Conference of Esperanto Teaching at Nanning, Guangxi Province, China, 6-11 November. She reports on it in a general letter.]

We had official receptions, artistic performances by different "Minority Nationalities" of Southern China through music and dancing, and most of all, hours of exchanging ideas how to improve Esperanto instruction and performance levels throughout Asia.

Chinese teachers of all levels and all ages traveled from far and near to participate, from Beijing on the 40° to Nanning on the Tropic of Cancer, and from Lanzhou 103°E to 124°E Dalian. Then add Esperanto teachers from Belgium, Sweden, US, and a school principal from Estonia who traveled eight days and nights by train from Tartu to Nanning and you know the level of excitement and dedication to helping people communicate in a 2nd language accessible to all—now! (Whoops, forgot to include Japan and Korea to complete the Asian participation.)

About forty people worked and planned for four and a half days. The importance of strengthening Asian groups and expanding learning opportunities throughout the Pacific Basin are urgent needs for the Universal Esperanto Association, and all-the-world communication.

As part of the effort to improve language competence 6 1/2 hours of International Exams were participated in by many. Eight or nine passed the Mezgrada (Intermediate) and another eight or nine passed the Baza (Elementary) Levels. [My colleague from Anui University] Chen Min and I passed the mezgrada "Tre Bone." I was so proud to be among the young Chinese teachers at the first ever Asian Conference for Esperanto Instructors. I'd never had the chance to take the Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj exam.

A Peak Experience!!!

Doris Vallon-Wheeler

[The ILEI exams will be offered to students at this year's San Francisco State University summer Esperanto workshop.]

[Antaŭ pluraj monatoj mi proponis al Eugeno Perevertajlo, la redaktoro de la Esperanto-paĝo en la plurlingva revuo *Soveta Uzbekistano*, skribi ion

pri tiu revuo. Jen lia respondo.]

La revuo estas organo de Asocio de amikeco kun aliaj landoj de Uzbekistano. La tasko de la Asocio kaj de la revuo estas trovi amikojn tra la mondo kaj rakonti al ili, interesi ilin pri la lando Uzbekio. Pri la lando, kies popoloj nun loĝas en la suda teritorio de Soveta Unio. Ĝiaj triboj estas disĵetitaj tra la oazoj de Meza Azio, en la grandegaj dezertoj Karakum kaj Kizilkum. La teritorion tranĉis la iama Granda Silka vojo, laŭ kiu iam vagis kamelaj karavanoj. La uzbekaj popoloj havas riĉan historion, kies kulturaj monumentoj respeguliĝas en la antikva arkitekturo kaj moderna arto. Pro la vivkondiĉoj kaj mahometanaj vivkonceptoj la uzbekaj popoloj estas tradicie gastamaj kaj mildanimaj. Nur la lastjardekaj kurbiĝoj de la nacia kaj socia politikoj naskis la malbelajn eventojn de la pasinta jaro. Sed tio ne estas karakteriza por ni. La elantikvecan konduton de la popolo povas nenio difekti.

En la revuo oni povas legi en via lingvo multon pri la lando. Tie estas inkrustitaj literaturaĵoj, priskriboj pri la popolaj specialaĵoj. En la revuo ĉiam aperas riĉekoloraj grandaj fotoj pri pejzaĝoj, arkitekturajoj, homoj de Uzbekistano.

Eŭgeno S. Perevertajlo

[Soveta Uzbekistano, en kiu aperas *Esperanto-paĝo en ĉiu dua monato*, estas abonebla pere de: EBSCO Industries Inc., 1st Avenue, North at 13th Str., Birmingham AL 35201; Creative Subscription Service, 1671 E. 16th St. Suite 189, Brooklyn NY 11229; Imported Publications Inc., 320 W. Ohio St., Chicago IL 60610; and Znanie Book Store, 5237 Geary Blvd., San Francisco CA 94118. Ĉe la lasta, la jara abonkosto estas \$17.]

[Joel Brozovsky, ELNA-ano kiu laboras kiel redaktoro ĉe la japana religia organizo Oomoto, verŝajne ne bezonas prezentiĝon al niaj legantoj.]

Kelkaj komentoj pri la NL 1989(6):

(1) Responde al Robert DWELLEY: *Usono* jes! Al la angla lingvo tute mankas adjektiva formo de nomo de nia lando. Hontinde! Kaj malkonvene. Ke en E-o oni povis belsone solvi la problemon estas granda avantaĝo.

Continued on page 7



## Letters from page 7

(2) Laŭdojn (denove) al Derek ROFF! La principojn mi jam pli-malpli klopodas uzi, sed lia priskribo estas sprita, eleganta, kaj efektive klariga. Mi esperas, ke la esperantistaro, kaj la tuta mondo, pli ekuzos tiajn metodojn.

(3) Laŭdojn ankaŭ al Ionel ONET pro utila konsilo por korespondemuloj. Lastjare en Japanio aperis dulingva libreto de Krizantemo, "Gvidlibro de Internacia Korespondado por Esperantistoj", kiu plenas je tia bona konsilo. Ĝi celas unuavice japanojn, sed ankaŭ aliajn—tial dulingve eldonita.

(4) Via vortludo responde al W. ORR

amuzas min: "La plej granda Buŝo en la lando."(!)

(5) La artikolo pri CEED kaptis mian atenton, kvankam ĝenerale ne estis multo nova al mi en ĝi. Sed la elektita ekzemplo tre bone ilustras mian grandan timon pri CEED—ke ĝi daŭre ripetados la erarojn de PIV. Jam WELLS korektis tiun eraron (*limeto* por "lime": Wells diras *limedo*-n) sed jen ĝi estas malkorektita en la nova vortaro! (Se *limeto* estas frukto, *limo* devas esti granda frukto!) Tiaj esceptoj al Esperanto komplikigas ĝin, precipe por tiuj ekster la lingvorondo de latinido.

Joel Brozovsky

[*Mi principe konsentas kun vi pri radikoj, kutime anglafrancdevenaj, kiuj finiĝas per -et; bedaŭrinde, ne ekzistas regulo por ekludi ilin el la lingvo. Tial, en El Popola Ĉinio 1990/2 ni povis legi artikolon pri vizito de la sovetia baletisto (ne baletisto) en Ĉinio. Tamen, kiam temas pri neoficialaj vortoj, la demokratiaj fortoj kutime venkas; jam en la suplemento de PIV Gaston Waringhien rezignis pri kaseto favore al la malpli franca sed pli esperanta kasedo.*]

# LOZAP → PASOJ

## BALBIN

La plej nova verko de ELNAano d-ro Julius Balbin, Imperio de l' koroj, poemaro, estas nun havebla de la eldonejo Edistudio en Pisa, Italio, kaj de la ELNA Libroservo.

## BURKE

Ni ĝojas ekscii, ke resaniĝante hejmen finvenis Jesse Burke post monato en malsanulejo pro koraj problemoj. Bondezirojn!

*Novajletero de E-Klubo de San Diego*

## FONSECA-GREBER

La 26am de novembro en Thousand Oaks, CA, edziniĝis s-ano Bonnie Fonseca, filino de ELNA-ano Prof. James Fonseca kaj diplomito de la San Francisco State University somera Esperanto-kursaro (1988) kun s-ano Nicolas Greber, funkciulo de la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, Svislando. La ges-anoj Greber nun loĝas en La Chaux-de-Fonds, kie ambaŭ laboras ĉe la KCE. ELNA deziras al la novgeedzoj feliĉon.

## KITTREDGE

Mortis je 18a de decembro 1989 s-ro Stuart Kittredge post longa vivo dediĉita al la Esperanto-movado kaj la Bahaa Kredo. S-ro Kittredge Esperantiĝis kiam li estis juna viro. En la lastaj jardekoj, li ĉiam klopodis ĉeesti la Universalajn Kongresojn de Esperanto. Li estis edzo kaj havis du infanojn.

*Mallongigita de nekrologo fare de Teodoro Browne en la BELMonda Letero*

## MURRAY

Mary Murray, who passed away on January 9, 1990, grew up in Oregon, the daughter of a circuit-riding Mennonite minister. She married Connell Murray in 1917. She was a valued friend to many of us and devoted to the Esperanto movement.

Following retirement from her teaching post in Arcata, California, where she taught

Esperanto to her fourth graders, Mary and husband Conn went off in 1963 to their first world Esperanto convention in Sofia, Bulgaria. Afterward they traveled widely in Europe. Returning home through New York, Mary became convinced that ELNA should have an office there for access to the major media. The Murrays, with the late Mark Starr, established the New York branch of Esperanto Information Center. Mary was successful in getting newspaper coverage and a staff of volunteers.

In 1965, following the world Esperanto Convention in Tokyo, Conn and Mary set out for a barnstorming trip around the world to 26 countries in Asia, the Middle East, and Europe. Whenever they arrived at a city, they contacted the leading newspapers and offered an interview. "No newspaper turned us down," Mary wrote. Their trip took them to Taiway, Hongkong, Bangkok, New Delhi. The interview in Manila brought downtown workers to their hotel. Ever the teacher, Mary set up a blackboard in their room and began lunch hour lessons for about three weeks.

In December 1965, an article in *The Daily Star*, Beirut, Lebanon was titled: "Esperanto Estas Moderna Lingvo por la Tuta Mondo" resulting in classes at their apartment in the Yacoubian Building on Chouran Street. Another long article in Beirut's *Kayhan International* paper brought more students.

While there, on Christmas Day, Mary cut cakes and served coffee at the Navy Canteen set up in a big hotel to serve 68000 members of the U.S. Sixth Fleet. She wrote: "Most Esperanto activity stopped for the holidays, but will contact the colleges now." Those were gentler times in the Middle East.

"Bonan Vojaĝon, Mary" was the title of an account by Zhu Mingyi of the Chinese Esperanto League, Beijing, in *El Popola Ĉinio*. Mary suffered a massive heart attack in Nanjing at the end of her tour in 1980. She

promptly won the hearts of the medical staff in her hospital. And Zhu spent a week sleeping on two chairs in the corridor outside her room.

"In the long course of her active and adventurous life, Mary never lost sight of the basic goal that meant more to her than anything else: peace. Peace on earth, and peace within—for, in her eyes, neither could ever be achieved without the other and both were required to heal this hurting world. In her pursuit of this dream, she wrote, traveled, spoke, and taught, and she wrote the book "They Shall Not Hurt Nor Destroy'." Each year she and Conn contributed a full stipend for a deserving student for advanced Esperanto studies at San Francisco State University.

"Mary Murray leaves us all a remarkable legacy. The lessons she would have liked us to learn from her life are, like all great truths, very simple—yet utterly vital: cherish the past, embrace the present, and don't fear the future; reach out to others and let them reach back; explore the inexplicable, believe the unbelievable. Expect a Miracle. And, most important of all, love one another, and the world, as best you can. For love like that—like hers!—will outlive us all. And that's the last and best gift she gives us."

*Corinne Murray and Cathy Schulze*

## WOOD

